

# KIO ESTAS CNT ?

## KIO ESTAS ANARKO-SINDIKATISMO ?

### Kun INTERNACIA LABORISTA ASOCIO STATUTOJ

**N**ACIA KONFEDERACIO DE LABORO ESTAS KONFEDERACIO DE SINDIKATOJ, KIES PRINCIPOJ KAJ CELOJ ESTAS LIBERECANAJ.

LA KAPITALISMA SISTEMO NE REFORMEBLAS ; ONI DEVAS FORIGI TIUN SOCIAN FUNKCIADON. SED LA RIMEDOJ UZATAJ POR TRAFI TIUN AN ON DEVAS ESTI EN PLENA AKORDO KUN LA CELOJ : LA MARKS-LENINISMA METODO MALSUKCESIS EN SANGBANEGO. TIAMANIERE, LA IDEO MEM PRI REVOLUCIO I IS EKSTREME SUSPEKTINDA LAŬ MULTAJ ULOJ, KAJ TRE FUNDAMENTE LIGITA AL LA IDEO DE TIMEGO.LAŬ NI ANARKO-SINDIKATISTOJ, LAŬ NI LIBERECANOJ, NENIO AN OS SEN LA KONSCIA KAJ LAR A HELPO DE LA PLIMULTO DE LA POPOLO. AL IUJ GRAVAJ SENPACIENCULOJ, AL IUJ SUPERISMAJ ANTAŬGWARDIOJ, AL IUJ BOMBULOJ KAJ DINAMITULOJ, NI DIRAS, KE NI NE RILATAS AL VI, AR LA SOCIO, KIUN VI NASKOS PER TIAJ RIMEDOJ PLEJEBLE ESTOS MALAMINDA. ESTAS KLARE AL NI, KE LA PROMESAJ AŬ LA BRILAJ AGOJ DE KELKAJ, IAM NE ANSTATAŬO LA IMPETON DE IUJ.

**CNT-AIT**

# KIO ESTAS CNT ?

## KIO ESTAS ANARKO-SINDIKATISMO ?

COLLECTION ESPERANTO

anarkui, ไร้รัฐไร้ราชบัลลังก์, anarchy, anarquía, اناركي, anarchia, אנארכיה, ANARCHIE, ANARĤIO, 無政府, ANARKIO, walang hari, anarşi, անարכי, VÔ CHINH PHŨ, anarkia, անարխիա, 无政府主义, anarchia

**CNT-AIT**

**Pour recevoir un exemplaire de notre Combat Syndicaliste,  
envoyez vos coordonnées à**

CNT-AIT  
7 rue Saint Remesy  
31000 Toulouse  
Tel/fax : 05 61 52 86 48

**<http://cnt-ait-toulouse.fr>**

## KIO ESTAS NKL ?

★ KIO ESTAS NKL ?	P. 3
★ KIO ESTAS HISPANA CNT ?	P. 7
★ KIO ESTAS ANARKO-SINDIKATISMO ?	p. 8
★ LABORISTO, SENLABORULO, STUDENTO !	p. 11
★ AL LA BARIKADOJ	p. 12
★ MAHNOVŜĈINO	p. 13
★ LA DIZERTONTO	p. 14
★ DIO KAJ DOLARO	p. 15
★ EKRIGARDO AL LA ANARKIISTA PARTO-PRENO EN LA ESPERANTISTA MOVADO	p. 16
★ INTERNACIA LABORISTA ASOCIO STATUTOJ	p. 19

## ★ KIO ESTAS NKL ? ★

## NACIA KONFEDERACIO DE LABORO ESTAS KONFEDERACIO DE SINDIKATOJ, KIES PRINCIPOJ KAJ CELOJ ESTAS LIBERECANAJ.

Ĝi batalas tiel sur la ekonomia tereno, kiel sur la socia (en niaj viv- kaj laborlokoj), kontraŭ socio pli malegaleca ol ĉiam, kiu forlasas sur la straton ĉirkaŭ 500 000 senloĝuloj, en kiu pli ol 5 milionoj da senlaboruloj, kaj pluraj milionoj da laboristoj pli kaj pli provizorigitaj, fleksebligataj kaj ekspluatataj penas simple por vivi, kiam la malplimulto da riĉeguloj, mastroj, spekulistoj, direktistoj... reciproke tenantaj siajn manojn, organizas la malpliboniĝon de niaj vivkondiĉoj kaj profitas de ĝi por spekulii kaj pliriĉigi. Tiu socio, en kiu kaj la estraroj de la reformismaj sindikatoj, kaj la politikistoj, kaj la politikaj partioj (de ĉia tendenco), ankaŭ respondaj pri tia situacio, batalas nur por ilia bonfamo kaj ilia propra pliriĉiĝo. Politikistoj, kiuj ne interesiĝas al niaj problemoj krom antaŭ balotoj, tiel esperantaj, pere de tiu, plifortikigi sian situacion kaj siajn privilegiojn, sed kiuj, kiam elektitaj, forlasas siajn promesojn. Sindikatoj, engluita en kunlaboro kun a mastroj kaj la registoj, kiuj ne hezitas subskribi interkonsentojn, kiuj fleksebligas kaj provizorigas la laboristojn kaj la senlaborulojn.

Tial ke neniu batalos anstataŭ ni, la anoj de NKL (senlaboruloj, studentoj, dungatoj...) organiziĝas por konstrui malsaman sindikatismon, sen dio kaj estro, sen elektito kaj sindikata oficestro, por starigi alian socion el siaj luktoj.

### NIAJ PRINCIPOJ

La rekta demokratio : en NKL, la decidoj estas faritaj de la bazo ; ĉefkunvenante, la sindikatanoj estas tiuj, kiuj decidas pri la agoj kaj direktado de sia sindikato - neniu alia (tie ĉi ne estas estro aŭ sindikatisto) ! Ni ankaŭ opinias, ke sur la tereno, la bataloj

apartenas al ĉiuj, sindikatanoj kaj nesindikatanoj, ne al iuj ajn politikaj aŭ sindikataj estraroj. La decidoj farendas ĉefkunvene kaj plenumitaj de personoj elektitaj, komisiitaj, kaj ĉiam eksigeblaj de la nekunvenantoj mem.

La rekta ago : ne estas la elektitoj de la interklasaj organismoj, de la entrepren-komitatoj, aŭ la politikaj elektitoj, sed nia movadeco, kiu permesos ricevi pliboniĝon. Por tio, nur fortrilato gajnigas. Plibone, ol la 24-horaj strikoj gvidataj de la sindikataj estraroj kaj de la ĉesupraj traktadoj, ol la provoj por politikaj utiligo, necesas kontraŭiĝi per la rekta ago, tiel dirante la ago de ĉiuj, kiuj batalas, sen pero. Kaj hodiaŭ, oni devas pretiĝi por firmaj agoj : kontinueblaj strikoj, okupadoj de decidaj kaj administraj oficejoj, de ejoj de politikaj partioj...

La solidareco : laboristoj ai senlaboruloj, de la publika sektoro aŭ de la privata, ni ĉiuj estas viktimoj de tiu sistemo, en kiu ni vivas. Ĉiuj, ni penas, kaj vidas niajn vivkondiĉojn malpliboniĝi. Do, ni ne lasu nin malunuiĝi de tiuj, kiuj estas la veraj privilegiuloj : mastraro kaj registaro, ili estas tiuj, kiuj maldungas nin, rompas niajn sociajn gajnojn, estas respondecoj pri la plimalboniĝo de niaj vivkondiĉoj. Estas do kontraŭ ili kaj ilia sistemo, ke necesas batali.

Rekta demokratio, rekta ago, kaj solidareco estas la bazoj de la anarko-sindikatismo.

## **NIAJ RIMEDOJ KAJ NIAJ CELOJ**

En ĉiu entrepreno, NKL batalas por tujaj pliboniĝoj, por la labordaŭra malpliigo (sen salajra malpliigo), kontraŭ la provizorigado kaj la fleksebligado... Sed, tial ke la ĉiaj subjugigoj ne haltas en la elirejoj de la entreprenoj, kaj ke la ekonomia subjugigo estas ligita al la politika, NKL do batalas kontraŭ tiun tutan socion. Tio necesigas ĉiutagan batalon, en niaj viv- kaj laborlokoj, kontraŭ la rasismo, la militistismo, la seksismo, la malliberigaj kaj kontraŭlaboristaj leĝoj.

Sed NKL ne forgesas, ke por ŝangi la socion, ne estas reformoj,

pre diriite, por periodo interkongresa. Tamen, povas okazi reelektado por alia mastrumadperiodo. La loko de restado de l'Sekretariato estos difinita ce la kongreso. Ce neeblo, pere de referendumo. La Sekretariato devas liveri skriban raporton pri siaj aktivajoj dum sia mandattempo. La raporto devas esti antaŭ-prezentita por ke la aligintaj sekcioj povu koni gin antaŭ la kongreso. Samtempe raporto administra kaj financa estas prezentita kaj sendita al la sekcioj. La kongreso nomas komisionon kiu, dum ĝia malvolvigo faras revizion pri konto kaj definitivan kontrolon.

## **- IX - LA FINANCOJ**

Por ke I.L.A. povu elvolvi kaj firmigi sian internacian aktivadon, kaj por doni al ĝia skriba propagando firman bazon, por ke povu esti eldonataj kun reguleco ĝiajn periodajn publikajojn, por ke ĝi povu partopreni en ĉiuj manifestacioj de la vivo de la revolucia sindikatismo en la diversaj landoj, por ke ĝi povu disvolvi la ideojn de l'revolucia sindikatismo en la landoj kie niaj ideoj kaj taktikoj havas nur malmulte da influo kaj, fine, por ke I.L.A. povu tuj kaj kontentige respondi al la solidarvokoj kiuj povos adresigi al ĝi, ĉiu membro de organizacio aliginta al I.L.A. devas ĉiujare pagi internacian kotizon fiksiton de la kongreso, au samvaloran monsumon en nacia mono, kun konsidero pri la sangvaluto inter ambau landoj. Por la sekcioj en malfacila situacio, la kotizo estas fiksita interkonsente kun la Sekretariato de I.L.A. La aligintaj sekcioj mem decidas pri la maniero ricevi la kotizojn de siaj membroj. Por la sekcioj kiuj deziras, I.L.A. havas glumarkon specialan gluendan sur la kotizkajretojn de la membroj. La aliginta sekcio sendas ĉiun trimonaton la nomitan kotizon.

## **- X - ELDONAĴOJ**

La Sekretariato eldonas :

1. Publikajojn kiu aperu kiel eble plej ofte. Estas dezirinde, ke ĉiu publikajo eldonita de organizaciaj filioj de I.L.A. au nur simpatiantaj rezervu en siaj pagoj specialan lokon por I.L.A.-infomioj au internaciaj solidarvokoj kaj por propagando generala.
- 2 . Propagandajn broŝurojn aparte destinitajn al landoj kie nia Movado ne havas nacian sekcion.
- 3 . Ĉiajn publikajojn, periodajn au ne, kies aperon decidus la kongresoj.

<http://www.cnt.es/sevilla/esperanto.html>

la Deklaracion de principoj kaj celoj de I.L.A. kaj, kiu laboras en lando kie estas neniu nacia organizacio aliginta al I.L.A.

e) Car I.L.A. Consistas el nur sekcioj laulegaj au ne, kun rektaj rilatoj en respektivaj landoj, povos konsekvence esti konsiderataj membroj de I.L.A. nur ekzilitaj grupoj, kiuj ce la Sekretariato de I.L.A. povos nete pruvi ke ili autentike reprezentas organizaciojn kiuj agas kaj laboras en la respektivaj landoj.

## - VI - LA INTERNACIAJ KONGRESOJ

La Internaciaj Kongresoj de I.L.A. okazas ciun duan jaron, se eblas. La Sekretariato, kun sufica limtempo, petas de la sekcioj la temojn au sugestojn destinitajn esti priraktataj ce la kongreso. Poste, la Sekretariato komponas la tagordon, kiu estas sendota al la aligintaj organizacioj, almenau ses monatojn antau ol komenci la Kongreson. La interkonsentoj kaj rezolucioj deciditaj de la Internaciaj Kongresoj estas nepraj por ciuj aligintaj asocioj, krom se ili, lau decido de la kongreso nacia au per referendumo forpusas la decidojn de Internacia Kongreso. Ce postulo de minimume tri aligintaj naciaj organizacioj, internacia decido povas esti submetita al revizio per referendumo en ciuj sekcioj. En la kongresoj kaj referendumoj internaciaj, ciu aliginta Centralo disponas unu vicon, sed la strebado al unanimeco estas ja rekomendinda antau ol decidi pri vcodonado.

## - VII - INTERNACIAJ DELOKIGOJ

Ciu membro de organizacio aliginta al I.L.A. , kiu pagis ciun siajn kotizojn, sed loganta en alia lando ot tiu kie li estas aliginta, devas plej malfrue unu monaton post sia alveno, fari sian translokadon al la organizacio respondanta al la nacia organizacio aliginta al I.L.A. Tiu translokado devas esti aprobita de la nacia organzacio, sen kontribuo de eniregistrado. Okaze de devigata multnombra ekzilado, la aligo estas nedeviga se oni apailenas al ekzilita asocio agnoskita de I.L.A.

## - VIII - LA SEKRETARIATO

Por kunordigi la internaciajn I.L.A.-aktivajojn, por akiri kaj organizi precizan informadon de la propagando kaj de la lukto en ciuj landoj, por plej bone sukcesigi la decidojn de la internaciaj kongresoj kaj por kontroli ciujn laborojn de I.L.A., Sekretariato almenau trimembra loganta tie kie I.L.A. fiksas sian sidejon estas elektita. La generala sekretario estas elektita de la kongreso au per referendumo internacia. La aliaj membroj devas esti elektitaj de la sekcio(j) nomitaj de la kongreso. La membroj de la Sekretariato dividas inter si la taskojn kaj la laboron. La Sekretariato kaj la sekretario estas elektitaj kiel pli su-

kiuj necesas, sed la faligo de siaj fostoj : la ŝtato kaj la kapitalismo, per sociala revolucio. Ĝi do aktivias por la starigo de alia socio, libereca, egaleca kaj solidareca.

## SOCIA PROJEKTO

La anarko-sindikatismo, liberiĝa de la kuratoreco de la partioj kaj de la politikaj organizaĵoj, havas sian propran socian projekton, en kiu ĉiu prenos siajn aferojn en siajn manojn por produkti la necesajojn por la vivo, por ke la progreso profitu al ĉiuj, kaj por ke la ekspluatantoj kaj la ekspluatatoj malaperas. Laŭ tiu vidpunkto, la anarko-sindikatismo "surbazigas sian socian penson sur vasta federacia organizaĵo, tiel dirante, organizaĵo de la bazo al la supro, sur la unuiĝo de ĉiuj fortoj por la defendo de komunaj ideoj kaj interesoj " (kvara punkto de la ILA-aj statutoj).

La ŝtaton anstaaos federacia socio funkcia de la bazo al la supro, laŭ la memmastrumadaj principoj. Eksigeblaj delegitoj kun precizaj komisioj, kunordigaj kaj mastrumadaj komitatoj sufiĉas por administri nuntempan socion, tiom malsimpla, kiom ĝi estas.

La ĝenerala skemo estus tiu de duobla federacio : unue, la komitatoj laborejaj, uzinaj, de industrioj loka, regiona, nacia kaj eĉ internacia, kiuj kunordigos kaj mastrumos la produktadon en sia fako.

Due, la komunumoj kunordigos la agadon de ĉiaj industrioj en sia nivelo, por disponi pri ĉiuj aĵoj necesaj por la vivo de ĉiu teritoria elemento. Jen tio, kion oni nomas "libereca komunismo". Iuj diros : utopio ! Simplismo ! Tamen, la studo de la socia sperto de la laborista movado, de la rompa periodo kun la instalita ordo, montras, ke iafoje, tutaj regionoj de lando estis mastrumataj rekte de la laboristoj surbaze de la principoj inspirantaj la agadon de NKL. En hispanio inter 1936 kaj 1939, la agrikultura produktado en Aragono, la ligna industrio kaj la transporta en Barcelono ; en Hungario dum la ribelo en 1956. La laboristaj kapablecoj al memorganizado estas grandegaj, kaj tiu rekta, ekonomia kaj socia

mastrumado superas la kapitalisma funkciado, kiu karakteriziĝas per tiuj milionoj da senlaboruloj, per siaj malsatego, per sia ekologia elĉerpado, sia nuklea armilarego.

Malgraŭ la nunaj malfacilaĵoj, malgraŭ la mokegoj de la teknikestroj, maldekstraj kiel dekstraj, la neceso de profunda socia ŝanĝo estas problemo vere nuntempa. Tion strebas NKL.

## ILA

La kapitalismo ignoras la landlimojn kaj la naciojn. En ĉiuj landoj, la sama ekspluata logiko submetas la laboristojn. Tial, NKL batalas ne nur en Francio, sed estas organizita mondscale en Internacia Laborista Asocio. Hodiaŭ, ILA celas batali la kapitalismon mondscale. Tio necesigas interhelpon kaj internacian solidarecon en la luktoj.

Hodiaŭ, ILA enhavas sekciojn en :

Britlando (Solidarity Federation - Solidareca Federacio) ; Germanio (FAU - Unuiĝo de Liberaj Laboristoj) ; Hispanio (CNT - Nacia Konfederacio de Laboro) ; Italio (USI - Sindikata Unuiĝo Itala) ; Japanio (RRU) ; Brazilo (COB) ; Argentino (FORA) ; Aŭstralio (ASF) ; Norvegio (NSF) ; Usono (WSA) ; Rusio (CRAS) ; Niĝerio (Awareness League - Kmnscieca Ligo) ; Portugalio (AIT-SP) ; Bulgario.(BKT) ; Ĉilio (Solidaredad Obrera - Laborista Solidareco) ; Ĉeĥio (ASF) Ĝi estas subtenita de grupoj "Amikoj de ILA" en Svislando, Kolombio, Bangladesĥ kaj Kanado...

**AIT / ILA : Boks 1977, Vika, N-0121 OSLO**

**( NORWAY / NORVEGO )**

d) Starigi provizorajn aliancojn, kiam la cirkonstancoj tion postulas, kaj lau difnita programo ne kontraŭanta la ci-suprajn paragrafojn a), b) kaj c), kun aliaj proletaj organizacioj sindikataj kaj revoluciaj, cele difini kaj realigi la komunajn internaciajn agadojn profite al la laborista klaso. Tiaj aliancoj neniam riĝtas esti starigitaj kun politikaj partioj, t.e. kun organizacioj kiuj rekonas la Staton kiel sistemon de socia organizado.

e) Senmaskigi kaj kontraŭbatali la arbitran perforton de ĉiuj registaroj kontraŭ la revoluciuloj adeptoj de la kauzo de la Socia Revolucio.

f) Esplori ĉiujn problemojn koncernantajn la tutmondan proletaron por plifirmigi kaj elvolvi la laboristajn movadojn en landoj kiuj defendas la rajtojn kaj novajn akirojn de la laborista klaso au la organizadon de la emancipa revolucio.

g) Entrepreni ĉiun recipokan helpon okaze de grandaj ekonomiaj bataloj au de akutaj luktoj kontraŭ la malamikoj konataj au kasitaj de la laborista klaso.

h) Morale kaj materie helpi la movadojn de klaso kies gvidado trovigas en manoj de la nacia ekonomia organizacio de la proletaro. La Internacio intervenas en la sindikatajn aferojn de unu lando, nur kiam ĝia filia organizacio tion petas au kiam ĉi-tiu eskapas de la ĝeneralaj decidoj de l'Internacio.

## - V - ALIGKONDICIOJ

Povas aligi al I.L.A. :

a) Naciaj revoluciaj sindikataj organizacioj apartenantaj al neniu Internacio. Aligo de dua organizacio centra nacia de sama lando povas esti akceptata nur far internacia kongreso, post antaŭinformigo de komisiono nomita de la Sekretariato de I.L.A., kaj konsistanta el po du membroj de ĉiu el la pritemataj organizacioj, t.e. de la jam aliginta nacia organizacio kaj de la alia nacia organizacio kiu deziras aligi, kaj de la I.L.A.-Sekretariato.

b) Minoritatoj de revoluciaj sindikatistoj organizitaj sine de la naciaj organizacioj aligintaj al aliaj Internacioj sindikataj, nur kaze ke la organizacio aliginta al I.L.A., se ĝi ekzistas en la lando, ĝin akceptas.

c) Sindikataj organizacioj profesiaj aŭ industriaj, sendependaj au filiaj de naciaj organizacioj ne apartenantaj al I.L.A., kiuj akceptas la principan deklaron kaj celon de I.L.A. kun tamen antaŭkonsento de la nacia Organizacio jam aliginta en la lando, se ĝi ekzistas. Oni povas akcepti la eniron en la Internacion de sindikataj organizacioj profesiaj au industriaj, kiuj eksigis au estis eksigitaj, nur post ĉies voca interkonsento de po du reprezentantoj de ĉiu el la aligintaj organizacioj, t.e. de la disiginta au eksigita, du el la nacia Organizacio de l'I.L.A. kaj de la Sekretariato de I.L.A.

d) Ĉiu Organizacio de revolucia sindikatisma propagaudo kiu akceptas

okazos dum decidaj luktoj inter la hodiaŭa kapitalismo kaj la morgaŭa liberkomunismo. Kousekvence, ĝi agnoskas la perforton kiu povu esti uzata kiel rimedo de sindefendado kontraŭ la perfortaj metodoj utiligataj de la regantaj klasoj okaze de la bataloj subtenotaj de la revolucia popolo por ekspropriado de la grundoj kaj produktrimedoj. Ĉar tiu ekspropriado povos okazi kaj sukcesi nur per la senpera interveno de la revoluciaj ekonomiaj organizacioj de la laboristoj, ankaŭ la defendo de la revolucio estos plenumenda de la ekonomiaj organismoj, ja ne de la milita aŭ samspeca organizacio kiu elvolvipas ekster ili.

10 . Nur en la organizacioj ekonomiaj kaj revoluciaj de la laborista klaso troviĝas la forto kapabla realigi la liberigon kaj la kreantan energion necesan por la reorganizado de la mondomo surbaze de Liberecana Komunismo.

### - III - NOMO DE LA INTERNACIA ORGANIZACIO

La internacia ligilo de luktado kaj de solidareco unuiganta la revoluciajn sindikatojn tutmondajn nomigas Internacia Laborista Asocio / ILA

ILA - Internacia Laborista Asocio

AIL - Associazione Internazionale dei Lavoratori

AIT - Asociación Internacional de los Trabajadores

AIT - Association Internationale des Travailleurs

AIT - Associação Internacional dos Trabalhadoras

IAA - Internationale ArbeiterInnen-Assoziation

IWA - International Workers Association

MAP - Mezinárodní Asociace Pracujících

MAT - Mba' Apovóra Tetapavegua

MSR - Miedzynarodowego Stowarzyszenia Robotników

MUR - Medunarodno Udruženje Radnika/ca

### - IV - CELOJ DE I.L.A.

I.L.A. havas kiel celojn :

a) Organizi kaj apogi la revolucionan luktadon en ĉiuj landoj por ĝisfine detruo la nunajn politikajn kaj ekonomiajn regimojn kaj starigi Liberecanan Komunismon.

b) Doni al la ekonomiaj organizacioj sindikataj nacian kaj industran sindikatan bazon kaj, fortigi el inter la ekzistantaj tiujn kiuj decidis lukti por la detruo de la stata kapitalismo.

c) Malebligi la enfiltrigon de kiu ajn politika partio en la sindikatajn ekonomiajn organizaciojn, kaj kontraŭbatali ĉiun provon de politika regado sine de la sindikatoj.

## ★ KIO ESTAS HISPANA CNT ? ★

Fondita la jaron 1910 en Barcelono, ekde la unuigo de la laboristoj-societoj ne ligitaj al la socialdemokratiaj emoj, CNT (Konfederacio Nacia de Laboro) sekvas fidele anarko-sindikatismajn principojn kiuj ĉiam reprezentis ĝin, kaj estas la nura heredanto en la Hispana ŝtato de la "Unua Internacia"-spirito.

CNT estas, nuntempe, la nura sindikato en la Hispana ŝtato tute sendependa de politikaj direktivoj, en kiu tiuj, kiuj decidas estas la alighintaj laboristoj kaj ne komitato de sindikatismoj, kiu rezignas je la financado de la ŝtato kaj de la Mastraro por teni sian ekonomikan sendependon kaj kiu ne lasas la negocajhojn al perantoj.

### NIAJ CELOJ

Disvolvi inter la laboristoj la asocio-spiriton, praktiki reciproke subtenon kaj solidarecon inter ili, reprezenti, defendi kaj promocii la ekonomiajn, socialajn, istajn kaj kulturajn interesojn de la alighintoj samkiel programi la necesajn agadojn por atingi la socialajn kaj ekonomiajn plibonigojn, ne nur por la alighintoj sed ankaŭ por la laboristoj ĝenerale.

### KIUJ NI ESTAS

CNT-alighintoj estas ĉiuj tiuj laboristoj, kiuj sin sentas ekspluatataj pro siaj mastroj, kaj ili vidas kiel tago post tago siaj rajtoj estas neagnoskataj, dum privilegiata klaso anoncas senhonte la kreskadon de siaj profitoj. Por helpi al la atingado de iliaj celoj kaj komprenante, ke la kreskanta tutmondigo de la ekonomio estas fenomeno, kiun la laboristoj ne povas ignori, CNT estas asociita kun aliaj memcelaj tutmondaj laboristaj organizacioj, ene de la Internacia Asocio de Laboristoj (AIT-Asociación Internacional de los Trabajadores), heredanto de la "1a Internacia" kaj fondita en Berlino la jaron 1922. La laboristoj de la ŝipkonstruejo de Puerto Real, la agrikulturistoj de Pedrera kaj sia regioneto, la laboristoj de la Nuklea Reaktoro de Lemoniz, estas atestantoj kaj ĉefroluloj de plenumataj luktoj pro la CNT dum la lastaj 20 jaroj kaj kiel la anarko-sindikatisma praktiko estas kapabla solvi la plendojn de la laboristoj.

Aliflanke, en CNT ne estas korifeoj kiuj diktas la organizaciojn-regulojn, sed estas ĉiuj alighintaj laboristoj kiuj alportas sian energion kaj siajn ideojn por funkcii ĝin ĉiutage.

## KIO ESTAS

### ★ ANARKO-SINDIKATISMO ? ★

#### KIO ESTAS N. K. L. ?

Nacia Konfederacio de Laboro estas anarki-sindikatisma organizaĵo : ni estas la franca sekcio de I.L.A, tieldirante ke ni estas la nuraj francaj anoj de Internacia Laborista Asocio, kiu kunigas sekciojn ne nur el la tuta Eŭropo, sed ankaŭ en Latina kaj Norda Ameriko, kiel en Japanio aŭ en Afriko. Estas fundamente kompreni, ke la anarko-sindikatisma ne estas idearo interaliaj, ne estas aro de pretaj ideoj, per kiu oni provas refari la realon, sed mal ke la anarko-sindikatisma teorio kaj praktiko estas la fruktoj de la sperto deplurgeneraciaj bataloj de virinoj kaj viroj, kies celo estis - kaj ankoraŭ estas - la profunda ŝanĝo de la socio kaj de la vivkondiĉoj. Centre de la anarko-sindikatisma, do estas la senĉesa volo eviti ĉian foriĝon inter la diro kaj la faro, inter la vivo kaj la penso. Nek aro de revoluciemaj receptoj, nek frostita idearo, la anarko-sindikatisma ĉefe estas viva kaj spertema, ĉar la vivo de siaj aktivuloj, iliaj lukt- kaj vivspertoj estas tio, kio naskas la teorion - ne la malo. Hodiaŭ kiel hierŭ, ĉiu anarko-sindikatisma, ĉiu aktivulo alportas siakontribuon por la starigado de teorio kaj praktiko, por la konstruado de la movado. La hispanaj NKL-anoj (tiel nomante la anojn de la hispanaj NKL, kiuj faris la revolucian de 1936) kutimis diri pri sia organizaĵo : "ĝi konstruis min", tio veras, sed ni aldonu ke ĉiu konstruas kaj nutras la movadon per sia energio. Do estas movado, kiu venas de la sperto de la uloj kaj celas ŝanĝi la vivkondiĉojn, kiujn oni trudas al ni. La batalo de la hispanaj faŝistoj estis "Viva la muerte" (vivu la morto). Laŭ ni NKLanoj, ĝi estas, estis kaj ĉiam estos "Vivu la vivo !".

#### LA VIVO, JES ! SED KIA VIVO ?

Kiel ŝanĝi la vivkondiĉojn, kiujn oni trudas al ni ? Kiel konstrui sociajn rilatojn surbaze de io alia ol superregado kaj submetado ? Kiel reposedi sian vivon ? Tute laŭ la historio (ekzemple, sklavaj ribeloj en la roma mondo, kamparanaj kaj jarmilistaj malsubmetiĝoj), la homoj malliberigitaj per la laboro kaj lamizero, konstante provis rifuzi la sorton, kiun oni faris al ili, kaj preni sian destinon en siaj manoj. Sed nur estas

goj de la komunumo.

4 . La revolucia sindikatismo estas kontraŭa al ĉiuj tendencoj de organizado inspiritaj de la Stat-centralismo kaj de l'Eklezio, car ili povas servi nur por pilidaurigi la vivon de la Stato kaj de la autoritato kaj strangoli sisteme la iniciatemon kaj sendependemon de la penso. La centralismo estas artifika organizado kiu submetas la tielnomatajn malaltajn tavolojn sub ĉiujn tielnomatajn altajn kaj kiu lasas minoritaton regi ĉiujn aferojn de la tuta komunumo - dum la individuo estas automatato kun movoj kaj gestoj ordonataj -. En la centralisma organizado, la bezonoj de la socio estas prokrastitaj je avantaĝo de kelkuloj, la diversecon anstataŭas la unuformeco, la personan respondecon anstataŭas unuanima disciplino. Tial, la revolucia sindikatismo bazas sian socian koncepton sur federacian organizado, t.e. , organizado de malsupre supren, sur unuigo de ĉiuj fortoj por defendo de ĉies ideoj kaj interesoj.

5 . La revolucia sindikatismo forpusas ĉiun parlamentan aktivadon kaj ĉiun kunagadon kun la privilegiaj organismoj, car ĝi pensas ke ĉe la plej libera sistemo de voĉdonado ne povas foraperigi la evidentajn kontraŭaĵojn ekzistantajn sine de la nuntempa mondordo, kaj car la parlamenta sistemo havas nur kiel celon : doni rajtosajnon al la regado de la mensogo kaj de la sociaj maljustaĵoj.

6 . La revolucia sindikatismo forpusas ĉiujn arbitre kreitajn politikajn kaj naciajn limojn, kaj deklaras, ke la tiel nomata naciismo estas la religio de la moderna Stato, malantau kiu sin kasas la materiaj interesoj de la posedantaj klasoj. La revolucia sindikatismo ne agnoskas alian diferencon ol tiun de la ordo ekonomia, regiona aŭ nacia, kaj postulas pot ĉiu grupo la rajton pri memdeterminigo solidare konsentita al ĉiuj aliaj samspecaj asocioj.

7 . Ja pro ankaŭ ĉi-tiuj kialoj, la revolucia sindikatismo kontraŭbatalas la militarismojn kaj la militon. La revolucia sindikatismo rekomendas propagandi kontraŭ la milito, kaj anstataŭigon de la ĉiamaj armeoj, kiuj estas nur la kontraŭ-revoluciaj iloj je la servo de l'Kapitalismo, per laboristaj milicoj, kiuj dum la revolucio estos kontrolataj de la laboristaj sindikatoj. Ĉie, krome, postulas la bojkoton kaj embargon kontraŭ ĉiuj materialoj kaj produktoj necesaj por la milito, escepte se temas pri lando kies laboristoj estas realigantaj revolucion socian. Tia-okaze, necesas helpi ilin en defendado de la revolucio. Finfine, la revolucia sindikatismo rekomendas la generalan strikon preventan kaj revolucion kiel agadrimedon kontraŭ la milito kaj la militarismo.

8 . La revolucia sindikatismo aprobas la rektan agadon kaj subtenas ĉiujn kuragigas ĉiujn batalojn kiuj ne kontraŭas al ĝiaj propraj celoj. La batalrimedoj estas : la striko, la bojkotado, la sabotado, k.t.p. La rekta agado trovas sian profundan esprimon en la striko generala, kiu devas esti samtempe laŭ la revolucia sindikatismo, la antaŭanonco de la socia revolucio.

9 . La revolucia sindikatismo, kontraŭa al ĉiu perforto organizita de ĉiuj aĵoj de registaro, kunkalkulas kun la fakto ke alfrontadoj ege sovaĝaj



modelon kaj ekzemplon, kaj iaj organizacioj devas faktigi, kadre de siaj ebloj, la laueble plej grandan influon sur aliaj tendencoj por asimili ilin en nian propran agadon, t.e. la komuna luktado kontraŭ ciuj malamikoj stataj kaj kapitalisman, daŭre konsiderante la cirkonstancojn pri loko kaj tempo, sed restante fidelaj al la celoj de la laborist-emancipa movado.

## - II - PRINCIPOJ DE LA REVOLUCIA SINDIKATISMO

1 . La revolucia sindikatismo, bazante sin sur la klasbatalo, celas al unuigo de la laboristoj en la ekonomiaj organizacioj de lukto kiuj batalas por la liberigo el la duobla jugo de la Kapitalo kaj de la Stato. Ĝia celo konsistas el reorganizado de la socia vivo surbaze de la liberecana komunismo per la revolucia agado de la laborista klaso. Konsiderante ke nur la ekonomiaj organizacioj de la proletaro kapablas atingi tiun objektivon, la revolucia sindikatismo direktas sin al la laboristoj estiel produktantoj, kreantoj de sociaj ricajoj, por ke inter ili germu kaj elvolvigu, malsame ol ce la modernaj laboristaj partioj, kiujn ĝi deklaras nekompetentaj por ekonomia reorganizado de la socio.

2 . La revolucia sindikatismo estas konvinkita malamiko de ciu ekonomia kaj socia monopolo kaj celas al ties abolicio per starigo de ekonomiaj komunumoj kaj de administraciaj organoj regataj far la laboristoj de l'kampoj kaj de l'uzinoj, formantaj sistemon de liberaj konsilioj sendependaj de ajna povo au politika partio. La revolucia sindikatismo starigas kontraŭ la stata kaj partia politiko la organizadon ekonomian de la produktado, kaj opozicias kontraŭ la regado de la homo far la homo, per la administra mastrumado de la aferoj. Konsckvence, la celo de la revolucia sindikatismo ne estas la konkero de la politikaj povo, sed la abolicio de ciu stata funkcio en la vivo de la societo. La revolucia sindikatismo konsideras ke kune kun la malaperado de la posedmonopolo, devas malaperi ankaŭ la regadmonopolo kaj ke ciu formo de Stato, sub kiu ajn saĝo ĝi kasigas, neniam povos esti rimedo por homa liberigo kaj, male, ciam estos kreanto de novaj monopoloj kaj privilegioj.

3 . La revolucia sindikatismo havas duoblan funkcion : daŭrigi la revolucian luktadon en ciuj landoj por la plibonigo ekonomia, socia kaj intelekta de la vivkondicoj de la laborista klaso en la limoj de la nuna societo, kaj eduki la popolojn por ke ili estu kapablaj por mastrumado sendependa de la produktado kaj distribuado per la alproprigo kaj per ciuj komponantoj de la socia vivo. La revolucia sindikalismo ne akceptas ke organizado de socia servo, baziganta sur nur la produktado, povus esti regata per simplaj registaraj legoj, kaj asertas ke ĝi povas esti akirata nur far la komuna agado de ciuj manaj kaj intelektaj laborantoj, ce ciu fako de la industrio, per la mastrumado de la uzinoj fare de la laboristoj mem, tiel ke ciu uzingrupo au industrifako estu autonoma pri la generala ekonomia organismo kaj reguligu sisteme, lau donita plano kaj surbaze de reciprokaj interkonsentoj, la produktadon kaj la distribuadon lau la avanta-

fine de la 19-ajarcento ke la revoluciema movado, la laborista movado, sukcesis organiziĝi kaj komencis esperi ŝanĝi la vivkondiĉojn, esperi ŝanĝi la sociajn rilatojn : la unua laborista internacio, la unua I.L.A. naskiĝis en Londono en 1864. Ni rimarku, ke inter la partoprenantoj, estis Bakunino kaj Markso. Ekde la komenco, la movado ŝiris sin inter du tendencoj : la aŭtoritataj socialistoj, grupiĝantaj ĉirkaŭ Karlo Markso, kaj la kontraŭaŭtoritataj -aŭ federaciistoj- ĉirkaŭ Miĥajlo Bakunino. Laŭ la kontraŭaŭtoritatuloj, la potenco, la superregado, la aŭtoritato, estas la fundamentoj de tiu socio, kaj nenio vere ŝanĝiĝos se la movado, kiu pretendas revoluciigi la mondon, mem organiziĝas aŭtoritate, kaj hierarĥie. Ni nun konas al kiuj monstreaĵoj kondukis kaj ankoraŭ kondukas la aŭtoritata socialismo. La tiamaj "liberecantoj" bone komprenis la eblajn sangajn aĉaĵojn de tia doktrino. Post la Kongreso de Hago en septembro 1872, la rompo inter la du tendencoj (aŭtoritata kaj kontraŭaŭtoritata) estas definitiva. Post tiu mallonga memorigo de la historia origino de nia movado, precipe necesas paroli pri siaj grandaj aktoj kaj siaj grandaj principoj.

## KELKAJ GRANDAJ PRINCIPOJ

Ni estas anoj de rekta demokratio : ĉiam dezirantaj tulecon, kiel anarko-sindikatoj ni elektis la proverbon "ĉi tie kaj nun". Se oni volas ke ĉio ŝanĝiĝu, necesas ke la potenco apartenu al la bazo, kaj nur al la bazo. La ĉefasembleoj do estas suverenaj, ili decidas la direktadon kaj la agadon ĉar ni havas nek gvidanton, nek estron. La delegitoj ricevas precizajn komisionojn kaj estas ĉiam eksigeblaj. La plenumkomitato havas nenian decidrajtan potencon : ili nur taŭgas por apliki la decidojn de la ĉefasembleoj. Ĉiuj konas tiajn eraregojn, kiujn alportis la organizaĵoj ekstreme hierarĥiaj, aŭtoritataj. La superregado, la perforto, kaŝitaj post ia ajn flago, nur povas konduki al submetado, ne al liberiĝo.

Ni persvadiĝas, ke se ni volas "kantontajn morgaŭojn", unue necesas ke la estanteco apartenu plej eble al ĉiu kaj ĉiuj, por alia estonteco. Nur la rekta demokratio garantias la direktadon de la lukto por ĉiuj. Estas pro tiu volo al reposedo de la lukto, ke ni elektas la rektan sindikatanagon, la senperan agon. Ni tute ne fidus la anojn de la pereco. Por esti pli preciza : laŭ ni, la direktado de striko apartenas nur al la strikantoj. La ĉefasembleoj devas esti suverenaj, la strikkomitato devas havi nenian decidrajtan potencon, la kontaktoj kun la mastraro devas esti rektaj, sen

la pero de la entrepren-komitatoj aŭ de la politikaj elektitoj. Estas nur per la reposado de ĉiuj siaj kapabloj (ofte malvartitaj de la nuna socia organizo), ke ĉiuj trafos sendependon. Laŭ ni, estas klara ke *"la liberiĝo de la laboristoj estas la faro de la laboristoj mem"*.

## LA SOLIDARECO

La nuna socia sistemo, bazigita sur la superregado kaj la submetado, sur la malrespondeco, fakte malhelpas ĉiun trafi veran direktadon de sia vivo : estas nur dum la fortaj momentoj de la sociaj movadoj, okaze de ĝenerala striko, ke la homoj restarigas siajn kapojn kaj konsciiĝas, ke ili tute povas organizi la solan aferon, kiu apartenas al si kaj senĉese foriĝas de si : la organizadon de siaj vivoj. Ili tiam ekscias, dum tiu privilegia momento, ke la timema individuismo, en kiu la sistemo volus enmeti ilin, estas eta afero kompare al la riĉeco kaj la ĝojo de partigo, kiun alportas la solidareco. Laŭ ni, anarko-sindikatoj, la solidareco estas la angula ŝtono de la movado, la salo de la vivo. Sen ĝi, nenio okazas, nenio eblas. Por ni, inter kamaradoj de NKL, ĝi estas vivata ĉiutage, neniam mankanta. Laŭ ni, pli ol devo, la solidareco estas plezuro. Rekta demokratio, komuna kaj rekta memmastrumado de la luktoj, solidareco inter ĉiuj kaj preter la landlimoj, jen la grandaj principoj de la anarko-sindikatismo.

## NIA CELO

La kapitalisma sistemo ne reformeblas ; oni devas forigi tiun socian funkciadon. Sed la rimedoj uzataj por trafi tiun ŝanĝon devas esti en plena akordo kun la celoj : la marks-leninisma metodo malsukcesis en sangbanego. Tiamaniere, la ideo mem pri revolucio iĝis ekstreme suspektinda laŭ multaj uloj, kaj tre fundamente ligita al la ideo de timo. Laŭ ni anarko-sindikatoj, laŭ ni liberecanoj, nenio ŝanĝos sen la konscia kaj larĝa helpo de la plimulto de la popolo. Al ĉiuj gravaj senpacienuloj, al ĉiuj superismaj antaŭgvardejoj, al ĉiuj bombuloj kaj dinamituloj, ni diras, ke ni ne rilatas al vi, ĉar la socio, kiun vi naskos per tiaj rimedoj plejeble estos malaminda. Estas klare al ni, ke la promesoj aŭ la brilaj agoj de kelkaj, ĉiam ne anstataŭo la impeton de ĉiuj.

**Unu ano el Quercy-Rouergue**



## - I - ENKONDUKO

La multjarcenta batalo inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj atingis minacan amplekson. La tutpotenca Kapitalo denove levas sian monstran kapon. Spite la internajn luktojn dissirantaj la kosmopolitajn burgaron kaj kapitalismon, ci-tiuj kreis belegajn kondiĉojn de rilatoj kiuj devas ebligi ilin lanci sin kun pliaj unueco kaj forto kontraŭ la proletaro kaj katenigi gin al la triumfanta caro de la Kapitalo. La kapitalismo organizas sin kaj disde la defensiva pozicio sur kiu ĝi troviĝis, lancas sin nun al ĉiuj frontoj de la laborista klaso. Tiu ofensivo havas sian profundan originon en tre precizaj kauzoj : en la konfuzeco de ideoj kaj laboristecaj principoj, en la manko de neteco kaj kohero rilate la estantaj kaj estontajn celojn de la laborista klaso, kaj en ties disdivido en ne nombrelajn tendencojn, unuvorte, en la malforteco kaj neorganizeco de la laborista movado. Kontraŭ tiu atakego de la internaciaj ekspluatantoj ĉiuspecaj, validas nur unu respondo : tuja organizado de la proleta armeo en batalorganismoj kiu kunigu en sia sino ĉiujn ĉiulandajn revoluciajn laboristojn, kiuj konsistigu inter si elgranitan blokon kontraŭ kiu dispistigos ĉiuj kapitalismaj manovroj kaj kies gravega pezo fine triumfos. Tiu movado de emancipado ne povas akcepti konduktlinion montritan de la tendencoj de la laborista movado celantaj harmonion inter kapitalo kaj laboro, dezirantaj internacian pacon kun la kapitalismo kaj asimiligantaj en la burĝa stato. Ĝi ankaŭ ne povas akcepti la tendencojn kiuj disvastigas la principojn de la diktaturo de l'proletaro, kontraŭajn al la celoj pri kiel eble plej granda libereco, bonstato de ĉiuj, t.e. celoj komunaj al ĉiuj konsciaj laboristoj. Kontraŭ la atako de la Kapitalo, kaj kontraŭ cianuancaj politikistoj, la revoiciaj laboristoj tutmondaj devas starigi veran Internacian Laboristan Asocion, kies ĉiu ano sciu, ke la emancipigo de la laborista klaso estos ebla nur kiam la laboristoj mem, estiel produktantoj, sukcesos prepari sin en siaj ekonomiaj organizacioj por havigi al si la tergrundon kaj la uzinojn, kaj ankaŭ lerni kunadministri ilin, tiele, ke ili kapablu daŭrigi la produktadon kaj garanti la socian vivon. Havante ĉiujn perspektivon kaj celon antaŭ si, la laboristoj devas partopreni en ĉiu agado celanta socian transformadon, ciam kun intenco pli-proksimigi al realigo de niaj propraj celoj ; sentigante en tiu partopreno la pezon de nia propra forto, klopodante havigi al nia movado, per propagando kaj organizado, la rimedojn necesajn, kiuj al ĝi ebligas anstataŭi siajn kontraŭulojn. Sarne, kie kie eblas, necesas realigi nian socian sistemon, kiel

organizo.

Aŭguste 1925 en Berlino TLES ekpublikigis sian monatrevuon « Libera Laboristo », kaj ĝi eldonis en 1933 bultenon serve de la anarko-sindikata internacia movado (Internacia Laborista Asocio) kunlabore kun Usono. Sed tiu tendenco tre rapide estis subpremita en ambaŭ landoj.

Dum la Civitana Milito en Hispanio, la esperantistaj agadoj estis sisteme persekutitaj en la zono kontrolita de Francio.

En Malaga, Februare 1937, la esperantista grupo estis pafmortigita pro la sola kialo, ke ĝi estas esperantista. Estas ironie konstati, ke la homo respondeca pri tiu krimo estis nomata honora prezidento de esperantista Kongreso post 31 jaroj.

La subpremo de la liberecana esperantista movado en Germanio, en Sovetunio kaj en Hispanio mortigis TLES.

Post la Dua Monda Milito, la esperantistaj anarkistoj aliaranĝis TLES-on. En 1946, en Parizo, Senstatano aperis unue kiel sekcio de la internaca Komitato de la junuloj anarkistaj. Ghi esprimis ankaŭ la vidpunkton de la anarkista esperantista movado, tiel daŭriganta la laboron inaŭrigitan de TLES.

La liberecana esperantista pariza grupo laboris je streta rilato kun la Komisiono de la internacaj anarkistaj rilatoj, tradukanta la bultenojn.

Ili ankaŭ korespondis esperante kun la kamaradoj de la aliaj landoj. Fine, en 1969, la anarkista sekcio de SAT denove ekstartis, publikigante ĉiumonatan revuon : « Libericana ligilo », cele al diskonigo de la anarkistan idealon en la esperantistajn klubojn, kaj al disvolviĝo de Esperanto en la anarkistaj sekcioj, kiuj estis inter la plej favoraj lokoj por kreski tiun lingvon.



## LABORISTO, SENLABORULO, ★ STUDENTO ! ★

Vi decidis batali porplibonigi viajn vivkondiĉojn, Vi volas organiziĝi sen lasi politikiston utiligi vin, Vi estas solidara al tiuj kiuj, kiel vi :

- rifuzas kapitulaci kontraŭ la mastro,
- rifuzas la rezignon, kontraŭekonomian sistemon, kiu kruelas kaj absurdas,
- rifuzas lasi trompi sin de la istoj politikaj, sindikataj, kaj asociaj,

Vi esperas konstrui mondon plijustan, kie la riĉaĵoj estus disigitaj laŭ la bezonoj, en paca kaj senlandlima mondo.

### UNUIĜI POR VENKI

NKL-ILA kunigas virinojn kaj virojn, kiuj baze batalas kontraŭ la ekspluatado, la mizero kaj la mensogoj de la politikistoj. NKL-ILA federacias (unuigas) naciskale personojn grupiĝitajn laŭ la anarko-sindikatismaj principoj, por batali en la entreprenoj, kvartaloj, metilernejoj. NKL-ILA partoprenas al nenia baloto (nek politika nek sindikata), ne petas monhelpon. Ĝi estas tute sendependa de la potenco. NKL-ILA estas organizaĵo de batalo sur la ekonomia kaj la socia terenoj.

### SUFIĈE FORTAJ POR ESTI SENDEPENDAJ, SUFIĈE SENDEPENDAJ POR ESTI ANUIĜITAJ.

Ĉiu individuo, ĉiu grupo, kies celo estas batali kontraŭ la kapitalismo kaj ĝia helpanto la ŝtato, devas scii ke sia forto staras unue en si mem. Kontraŭ la potenco de la mastroj kaj de politikistoj, la sendependo estas nenio sen la unueco kaj la solidareco. Tial, ĉiu rajtas al la parolo. La diverseco, la sendependo, la solidareco, la volo, la interkorporaciismo, estas partoj el la bazaj valoroj de la anarko-sindikatismo, lai kiuj ni batalas por alia estonteco.

### NIA PATRIO ESTAS LA MONDO !

NKL estas anarki-sindikatismaj organizaĵoj. Ĝi do naciskale federacia lokajn sindikatojn grupiĝitajn en Regiona Unuiĝo. Sed la ekspluatado ignoras la landlimojn. Tial, NIKL mem estas ano de Internacia Laborista Asocio (ILA) kun la anarko-sindikatismaj organizaĵoj kiuj, en landoj tiel malsimilaj kiel Hispanio, Rusio, Niĝerio, Japanio, Usono, Aŭstralio, Brazilo, ktp... praktikas la saman batalon.

Loke, la aktivuloj de NKL-ILA, kiuj laboras en sama loko, kuniĝas sindikata sekcio. Ekzistas sekcioj en diversaj fakoj (el publika aŭ el privata sektoro).

NKL privilegias la interkorporaciismon ĉar ĉiuj dungitoj, aklivaj aŭ ne, suferas la samaj atakoj. Estas ĉiuj kune, el publika fako kaj el privata fako, nedaŭraj aŭ daŭraj laboristoj, dungatoj kaj senlaboruloj, ke ni devas batali.

## ★ AL LA BARIKADOJ ! ★

Negras tormentas agitan los aires

Nubes enormes nos impiden ver

Aùn que nos espera el dolor y la muerte,

Contra el enemigo nos llama el dever.

El bien màs preciado es la libertad

Hay que defenderla con fé y valor

Alza la bandera revolucionaria

Que lleva el pueblo a su  
emancipacion

A las barricadas,

Por el triunfo de la Confederacion.



Nigraj ŝtormegoj skuegas aerojn

Kaj grandegoj nuboj nin malhelpas vidi  
plu

Eĉ se nin atendas doloro kaj morto

Kontraŭ malamiko nin antaŭenpuŝas  
dev'

Nenio pli prezas ol la Liberec'

Devas ni ĝin savi kun fid' kaj kuraĝ'

Altigu la flagon revolucieman

Sub kiu popolo marŝas al elservutig'

Al la barikadoj, al la barikadoj,

Por la triumfo de la konfederaci'.

*(Trad. :JoMo kaj Liberecanoj )*



La principo de la blinda neŭtraleco estis forlasita je la profito de la ideo, ke Esperanto povas helpi la batalon por la emancipiĝo de la laborista klaso. Tri celoj estis indikitaj :

- la uzado de Esperanto por helpi la internacian laboristan klason.
- la plifaciligado de la rilatoj inter la membroj de SAT, kaj la kreskado de la homa solidareco.
- la informado kaj la edukado de la membroj por igi ilin la plej kapablaj kaj kleraj el la internaciistoj.

Kiam SAT estis kreita, multe da laboristoj el ĉiuj tendencoj okulumis al la soveta Revolucio, kiu aperis kiel unua etapo de la triumfo de la socialista ideo. Sed dum la mito de la Revolucio elvaporigis, la esperantistoj revoluciaj, kiuj estis influitaj de la rusaj okazaĵoj, ekdisreviĝis.

Krome la komunistoj estis pli kaj pli malcedemaj, kaj provis, ke SAT estu ekskluzive uzata de Moskvo. Interna konflikto eksplodis kaj daŭris dek jarojn, inter la komunistoj kaj iliaj opoziciantoj, kiuj volis, ke SAT restu kultura kaj eduka, politike sendependa organizo serve de la laborista klaso, kiel estis decidite en Prago.

Fine, en 1931, la dekunua Kongreso en la urbo Amsterdamo rifuzis per granda plimulto la hegemonion de la komunistoj, kaj tiuj ĉi forlasis la organizon kaj fondis sian propran diferencon asocion.

Du Rusoj kaj unu Franco kreis la kernon de TLES (Tutmonda Ligo de Esperantista Senstatano), kiu rekrutis en dekkvino da landoj dum kelkaj monatoj. Post la malapero de siaj du amikoj, la franca Julien Migny, helpata de sia amikino Juliette, plenumis la administradon de TLES. La nova esperantista organizo varbis ankaŭ membrojn en Belgio, en Ĉinio kaj en Japanio.

En 1923, la rusaj anarkistoj A. Levandowsky kaj J. Zilberfarb fondis ISAB-on (Internacilingva Scienca Anarkisma Biblioteko). Ili invitis la aliajn esperantistojn en la mondo cele al kreado de monda

## EKRIGARDO AL LA ANARKISTA PARTOPRENO EN LA ★ ESPERANTISTA MOVADO ★

**RONALD CREAGH & KARINE TOURRATON.  
TRAD. MARIELLE GIRAUD ET FRÉDÉRIC LE MAGADURE**

La anarkistoj estis inter la pioniroj de la laborista esperantista movado en Stockholmo en 1905, poste en Parizo en 1906, kiam estis kreitaj la tute unuaj grupoj. La pariza klubo Paco-Libereco entreprenis interesan eldonolaboron. En Shanhajo, la fama verkisto Pa Chin (Ba Jin) lernis Esperanton, kaj vortaro de la chinaj kaj eksterlandaj verkistoj klasis lin inter la esperantistaj intelektuloj.

Malrapide sed laŭgrade, Esperanto estis enkondukata en la revoluciajn kaj laboristajn klubojn. La anarkistoj kaj la anarko-sindikatoj, kiuj antaŭ la Unua Monda Milito reprezentis la plej multajn membrojn meze de la laboristaj grupoj, kuniĝis en la internacia asocio « Paco Libereco » », kiu eldonis la revuon « Internacia Socia Revuo ».

La deka universala Kongreso, kiu devis okazi en Parizo en 1914, aperis kiel la elektita momento por krei, sur la franĝo de la pacista movado, organizon de revoluciaj esperantistoj. Sed la milito nuligis la Kongreson. Nur en 1921 povis okazi en Prago la unua kongreso de la esperantistaj laboristoj ; ĝi naskis SAT-on ( Sennacieca Asocio Tutmonda ).

SAT ne estis politika partio, sed kultura kaj eduka organizo. Ĝia celo estis vekti racian sintenon, kiu ebligus kompreni, kompari kaj prijuĝi la diversajn ideojn kaj tendencojn. La membroj devis ricevi kiel eble plej multe da informoj, por elekti la plej honestajn kaj fideblajn rimedojn por la emancipiĝo de sia socia klaso.

## ★ MAHNOVŜĈINO ★

Mahnovŝĉino, Mahnovŝĉino  
Nigras flagoj pro la malesper'  
Ili ruĝas pro kolero,  
Ili nigras pro mizer'

El montoj kaj el la valoj,  
Sub la neĝo kaj en la vent'  
Grupe niaj partizanoj  
Jam alkuris ja po cent'

Mahnovŝĉino, Mahnovŝĉino  
En vi luktis la partizan'  
Kiu volis en Ukrainio  
Liberan landon sen tiran'

Januare lenina kontraktoj  
Vendis la landon al la German'  
Sed julie Mahnovŝĉino  
Lin forpelis per la man'

*(Trad. : JoMo kaj Liberecanoj)*

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkcd18>



★ LA DIZERTONTO ★

## Teksto Boris Vian , traduko Georges Lagrange

Sinjoro Prezident'  
mi skribas vi leteron  
kaj havas mi esperon,  
vi legos kun atent'.

Dum mia kaptitec'  
jam oni la edzinon  
for ŝtelis, kaj animon  
kaj la pasinto eĉ.

Jam morgaŭ sen prokrast'  
fermiĝos mia pordo  
al jaroj de la morto  
kaj fuoĝs mi kun hast'

En almoz-peta viv'  
mi iros tra la mondo  
mi estos vagabondo  
kaj diros re al vi :

Alvenis jen paper'  
kun la ordon-invito  
foriri al milito  
merkrede je l'vesper'.

Mi diras sen rezon'  
ke tion mi ne faros  
mi sur la ter' ne staros  
por murdo de la hom'

Ne ofendiĝu vi,  
se mi per ĝi vin spitas,  
mi ĉion mem decidas  
kaj tuj dizertos mi.

En mia juna aĝ'  
formortis mia patro,  
foriris mia frato,  
kaj brulis la vilaĝ'.

Patrino pro sufer'  
jam kuŝ as en la tombo,  
ne zorgas ŝi pri bombo,  
ne zorgas eĉ pri verm'.

- Rifuzu al buĉad'  
rifuzu murd-inciton  
ne faru vi militon  
rifuzu al murdad'

Se fluu nun la sang'  
la propran do vi donos,  
jen kion mi proponos  
Sinjor' de alta rang'.

Kaj se vi serĉos min  
eksciuj trup' ĝendarma  
ke estos mi senarma ;  
ĝi pafu do sen tim'.

★ DIO KAJ DOLARO ★

## La 11-an spetembro 2001

Militaro de dio aŭ de dolaro, unu aroĝmega, la aliaj multe ambiciema. Du megaemaj flankoj, kiuj interbatalas kun multege da anonimaj vivoj.

Unu el ili mortigas per aviadila bombado, per organizita ŝtelado de la mondo, per mortigista blokuso : 30 000 mortuloj en es-Jugoslavio sube la NATO-a bombado, 200 000 mortuloj per manko de rimedoj en Irakio. 30 milionoj da mortuloj de la VIH dank'al usona firmao kiu ne volas ellasi liajn brevetojn. Ĉiutage 40 000 infanoj mortas malsate aŭ malsane. Estas alvoko al malamo, invito al mortigo.

La aliaj petrodolaraj reĝistetoj aŭ diktatoroj sen lando, nutriĝas per senesperuloj, de iliaj mizeroj, de iliaj suferoj. Ili fabrikas mortigistarojn, promesante la eternan miraĝon : paradizon plenigitan de mortiguloj

Kapitalismo aŭ religio, estas du vizaĝoj el sama subpremo, per ekspuatado, submeto, kaj teruro. La kvin miloj da morto en Usono egalvaluas al miliono da mortuloj el mondo pro malveraj sanktaj rankontoj, kaj veraj dolaraj rakontoj.

La masakro de la 11-a de Septembro ĵus memoriĝi nin ke neniu milita teknikaĵo povas kontraŭiri la senesperon.

Neniu povo, eĉ moderna kaj "ĝentila", povas nei homajn vivojn sen morti siavice.

La marĉandaj propagandistoj forĝesis ke homoj, ĉu ili malsatiĝas aŭ satiĝas, ĉu ili aĉetas aŭ ĉu ili vendas, ne povas vivi sendignece kaj senespere.

**CNT/ AIT-ILA**